ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO

7-8

Julio-aŭgusto 2024 Kol. 469/40

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo**: Velké Losiny, Esperantistoj denove subtenis rulseĝulojn, La 35-aj Esp. Tagoj de Krakovo, Ne ekzistas estonteco sen junuloj, Pri la agado, Feliĉaj maljunuloj, Ankoraŭ unu atingo de UK, Trista anonco.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## Velké Losiny

La 18-an de majo, kiel ĉiujare, okazis E-renkontiĝo en Ŝumperk. Ĉi foje ni kunvenis en la kastela parko en la urbeto Velké Losiny, kie staras E-memorarbo (kanada cugo), plantita en la j. 1967 de esperantistoj el Ŝumperk. Post komuna memoro kaj necesa foto ni vizitis la kastelon.



La kastelon (1589) lasis konstrui Johann jr. el Žerotín, dum kies regado Velké Losiny evoluigis sian pozicion. Li larĝigis bandomojn (1592), lasis konstrui renesancan luteranan preĝejon kaj lernejon kaj paperfabrikon (1596), kiu estas la lasta paperfabriko en Eŭropo, kie oni produktas tradician manfaritan paperon.

Post vizito de la kastelo, kie ni vidis la plej malnovan kahelan fornon en Ĉeĥio (1587) aŭ portreton de barbo-nobelino, ni transiris en proksiman gastejon, kie atendis nin varma gulaŝo, malvarma biero kaj vivmuziko. Nedividebla parto de nia renkontiĝo estis ankaŭ aktualaĵoj de aliaj E-kluboj kaj tombolo. Kaj poste nur deziro – denove ĝis venontjare !

S. Nováková

## Esperantistoj denove sukcese subtenis rulseĝulojn

Kio estas Paraple? La vorto mem estas ĉeĥa parolesprimo por „pluvombrelo“, sed samtempe ĝi estas kvazaŭa mallongigo de „paraplegio“ – senmoviĝo de kruroj post damaĝo de mjelo (ĉeĥlingve „mícha“). Pri subteno de homoj trafitaj de ĝi (kutime post akcidento) kaj ilia revenigo al aktiva plenvalora vivo okupiĝas praga **Centro Paraple**. Temas pri publike utila civitana grupiĝo, fondita ĝuste antaŭ 30 jaroj (do en 1994) de Asocio de paraplegiuloj kaj de konata artisto Zdeněk Svěrák.



La agado estas realigata precipe en ĝia senbariera sidejo en Prago-Malešice en kunlaboro de fakuloj (entute 70 t.n. kernaj kaj 30 eksteraj), kiuj ofertas larĝan spektron de servoj kaj terapioj, por kelkdek personoj ĉiutage. Dumjare uzas ilin pli ol 1500 handikapuloj el la tuta respubiko.

Pli da informoj ĉeĥlingve eblas akiri en la retejo www.paraple.cz kaj en ties trifoje jare eldonata senpaga reta magazino. Vi povas mem viziti la centron en la str. Ovčárská 471 kaj ĝian kafejon por publiko, malfermitan dum labortagoj inter 10:00 kaj 21:00 (vendrede ĝis 19:00).

Proksimume 50% de la jara budĝeto de la organizo (80 milionoj CZK) estas kovrataj de solidaraj donacoj de invidiuoj kaj firmaoj. Unu el la manieroj kiel kunligi sanulojn kaj malsanulojn kaj ankaŭ finance subteni agadon de la Centro, estas bonfara sporta alvoko **Kuro por Paraple**, kiu ĉi-jare okazis jam la 24-an fojon.



Krome, ekde 2021, estigite origine pro la pandemiaj limigoj, okazas en majo ankaŭ **trisemajna Virtuala kuro**. Kial virtuala? Ĝi tute ne signifas ŝajnan ĉekomputilan moviĝon, sed moviĝon realan - en ajna loko, tempo kaj rapideco - kaj kolekton de kilometroj pere de poŝtelefona aplikaĵo. Ĉiu konkursas precipe kontraŭ sia propra pigreco aŭ nekonstanteco, la kvanto de kilometroj mem ne tiom gravas, nur povas doni iom da motiviĝo.

Kiel praktike ies moviĝo povas helpi la Centron? Ĉiu aliĝinto pagas startkotizon (ĉi-jare 300,- CZK), kiu sume kreas nemalgravan parton de la budĝeto de la organizo. Ĝi helpas kunfinanci la ĉefan servon de Paraple – trisemajnan kompleksan korpe kaj socie rekapabligan resanigan restadon. En la alvoko oni povis ne nur kuri, sed ankaŭ piedmarŝi, bicikli, rulsketi, marŝi kun infanĉareto aŭ kuri kun hundo – kaj ne nur individue, sed ankaŭ en teamo.

Tiel iniciatite de Vlasta Pištíková el la klubo E-mental' estiĝis en 2017 ankaŭ **Teamo Esperanto**. En 2023 ĝi havis 39 membrojn kaj ilia nombro kreskis ĉi-jare al **54** (inter ili ankaŭ eksterlandanoj el dek landoj). Per sia movo ili sume kolektis **6244** poentojn (**kilometrojn**) **kaj minimume 16 200 CZK por Paraple** (krom baza startkotizo eblis ankaŭ libervole aĉeti iujn produktojn aŭ krome subteni konkretajn agadojn). **Inter 63 teamoj el la tuta Ĉehio esperantistoj gajnis belegan kaj gratulindan 5-an lokon**. Dum la reala Kuro por Paraple, okazinta la 25-an de majo, en la parko de Malešice, estis i.a premiitaj la plej bonaj individuoj kaj grupoj. En la kategorio Marŝantoj-viroj la 1-an lokon akiris esperantisto Martin Vávra el Prago, kiu dum 20 tagoj sukcesis piediri nekredeblajn 627 km.



Elkoran dankon al Vlasta por la iniciato kaj kunordigo kaj al ĉiuj aktivaj partoprenintoj. Ankaŭ por mi estis ĝojige ĉeesti. Jen

efika kaj inspira ekzemplo, kiel kunligi subtenon de propra sano, helpon al bezonantoj kaj diskonigon de Esperanto inter la publiko. Venontjare povas fortigi niajn vicojn ankaŭ vi!

*Pavla Dvořáková*

## La 35-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo

Nia ĉeĥa-morava-slovaka triopo – Eva el Pardubice, Anja el Vidĉe kaj mi el Žilina – post la pasintjara raviĝo de la Esperanto-Tagoj de Krakovo, ankaŭ ĉijare decidis veturi tien. La tradicia aranĝo de la krakova esperantistaro okazis de la 31-a de majo ĝis la 2-a de junio 2024. Tamen, la dimanĉan ekskurson al Niepołomice kaj ties ĉirkaŭaĵo ni ne partoprenis, ni uzis tiun tagon por reveturo hejmen.
La vojo al la iama reĝa ĉefurbo de Pollando estis senproblema kaj ĵaŭde vespere ni bone atingis nian tranoktejon en proksimeco de la Kulturcentro, kie la aranĝo okazis. Vendrede matene, duonhoron post la naŭa, jam komencis ariĝi la partoprenantoj kaj komenciĝis ĉirkaŭbrakado inter malnovaj konatuloj kaj konatiĝado kun la novaj amikoj. Dum sabato la partoprenantaro eĉ plinombriĝis tiel, ke preskaŭ ne sufiĉis la salono, ĉar alvenis tiuj, kiuj pro sia labora okupo ne povis veni pli frue.
Tiu ĉi-jara aranĝo estis pli internacia ol la pasintjara. Dum ĝi ni povis sekvi aron da interesaj prelegoj.
Ĉi-jare furoris tiuj pri diversaj mondvojaĝoj. Tuj komence Adam Wilkus prezentis al ni kelkajn legindajn librojn pri vojaĝado de eminentaj esperantistaj aŭtoroj, inkluzive de la libro de Bruno kaj Maryvonne Robineau, kiuj dum ok jaroj mondvojaĝis, pagante la tranokton kaj manĝon per sia laboro ĉe la gastigantoj. Interese estis aŭdi, ke Bożena kaj Marian Kocyk

kune kun la 16-kapa pola grupo povis viziti Malton senpage, lernante tie la anglan lingvon, ĉar ili sukcesis akiri por tio monon el subvencio; memkompreneble, ili povis viziti kelkajn lokojn sur tiu insulo kaj peri al ni siajn impresojn pri ili. Piotr Karcz montris al ni mondon el la selo de sia motorciklo, vojaĝinte al la ĉijara kongreso en Ŝtrasburgo. Ulrich Matthias el Germanio parolis pri Esperanto en Malagasio kaj entuziasmo de lokaj esperantistoj, kiuj deĵoros ankaŭ dum UK en Aruŝo. Robert Kamiński prezentis la rozkoloran urbon Tuluzo, konatan per siaj rozkoloraj brikaj konstruaĵoj. La fama pola reĝisoro, Roman Dobrzyński, prezentis al ni du siajn filmojn: „Japana printempo" kaj "Heredaĵo de Inkaoj". Kaj Krystyna Zgud havis bonan ideon prepari bildprezentaĵan fotoekspozicion pri la vojaĝoj de esperantistoj; inter ili estis ankaŭ fotoj el la marŝado al la montopinto Poludnica, kiun ofereme dum 39 jaroj aranĝis nia karmemora Johano Vajs, forpasinta neatendite antaŭ kelkaj jaroj.
Sed ne nur pri diversaj vizititaj landoj ni povis ekscii. István Kabók el Hungario prezentis al ni fragmentojn el la Hungara Antologio; por ni estis interese vidi, kiel lerte li per siaj fingroj legas brajlan skribon. Dominik Bałaban klarigis al ni principojn de la Goo-ludo, kaj la kuraĝuloj tuj havis eblecon ĝin praktiki. Boris Arrate Verrate, la kubano loĝanta en Hungario, konfirmis, ke *Ĉiu popolo kun sia lingvo kaj Eperanto por ĉiuj*, krome li prezentis al ni filmet-fragmentojn el sia muzikumado kun la hungara blovorkestro. La doktoro Włodzimierz Opoka demandis nin, ĉu eblas facile maldikiĝi, kaj atentigis nin pri neseriozeco de kelkaj firmaoj, vendantaj, precipe rete, falsajn produktojn. Barbara Pietrzak konatigis nin kun la elsendoj de la Pola Retradio kaj ties retpaĝaro kaj Magdalena Tatara parolis pri la agado de ILEI, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Anna Cisło prezentis al ni, kiel ŝi esperantigis sub la titolo *Verda kateto* libron de Danuta Stanulewicz, skribitan en dialekto. *Verda kateto*, ilustrita de juna artistino Aleksandra Czajka, povas esti bone uzata ankaŭ por lingvoinstruado. Kaj same, kiel pasintjare, elstaris enhave kaj ankaŭ lingve la prelego de juna studento Tymoteusz Smoliński, kiu al ni ĉi-foje alproksimigis manĝeblajn sovaĝajn legomojn, eĉ proponis kelkajn el inter ili por nia gustumado.
Bonegis ankaŭ la kulturaj eroj: Teatra grupo sub gvido de Jolanta Kieres prezentis al ni judajn kantojn kaj ŝercojn sub la titolo *Tiuj urbetoj jam ne ekzistas*. Halina Kuropatnicka-Salamon, blinda poetino el Vroclavo, prezentis al ni kelkajn versojn el siaj libroj, akompane de same blinda kantisto Wojciech Lawnikowicz. Brilis piana recitalo de la elstara juna pianistino Aleksandra Czajka (jes, la sama, kiu ilustris *Verda*n *Kato*n), abiturientino de Muzika Mezlernejo en Vroclavo. Boris Arrate Verrate kun sia hungara amiko Zsolt mallonge koncertis per siaj blovinstrumenoj. Kaj ambaŭ vesperoj apartenis al



komuna kantado sub gvido de Halina Różanek kaj ties akordiono. Ni ne forgesu sanktan meson en la lingvo internacia, kiun la pastro Roman Gmyrek servis por ni en la kapeleto de la proksima loka preĝejo.

Fine de ĝi ravigis nin Vojtek Lawnikovicz per sia prezento de *Ave, Maria*, akompane de la orgeno.
Vendredon, dum la mallonga antaŭtagmanĝa promeno, Adam al ni en la proksima parko montris du statuetojn de drakoj, kiuj klopodos fariĝi tiom multnombraj, kiel la gnomoj en Vroclavo. Ilian plinombriĝadon ni volas kontroli venontjare. La Kulturaj Tagoj en Krakovo kaj iliaj bonegaj, spertaj organizantoj tiun vojaĝon valoras. Bonvolu veni ankaŭ vi!

*Fejfi 2024 06 07*

## Ne ekzistas estonteco sen junuloj

En Legio de Bona Volo (LBV) ni ne nutras etoson por konflikto inter generacioj. Male: ni kunigas al la trezoro de spertoj de la pli maljunaj la valoran energion de la pli junaj. Kaj la popolo per tio gajnas.
Ni konstante rememorigas la junulojn, ke iam ankaŭ ili havos blankajn harojn. Same frate ni parolas al la grandaĝaj, kaj rememorigas ilin pri tio, ke ili jam estis junaj... Estas tre grave ne forgesi tion...
Morgaŭ ankaŭ junuloj maljuniĝos... Se ili volas konservi la saman spiriton de espero, la saman junecan mienon, malgraŭ la naturaj haŭtsulketoj kaŭzitaj de la tempo kaj malgraŭ la ĉiam belaj blankaj haroj, tiam ili devas praktikadi Bonfaradon. Ne eblas alia vojo. La Spirito plifortigas nian entuziasmon, ĝi donas al ni la eternan belecon de simpatio. Ne ekzistas pli efika kosmetikaĵo ol trankvila konscienco.
Eble tio ŝajnas paradokso. Tamen, lando, kiu rifuzas apogon al siaj maljunuloj ne kredas pri la estonteco de sia junularo. Kio estas nacio, se ne ĝiaj komponantoj? Se estas estonteco, junuloj maljuniĝos. Ili vivos pli longe. Ili emeritiĝos... Strikta

elmontrado de tuja momenta ĝuado estas elmontro ankaŭ pri nekredo pri la estonteco. Kaj homoj, kiuj povas, tiuj pensas: “Ni travivu ĉion ajn nunmomente, antaŭ ol ĉio estingiĝos! Kaj kiuj sukcesos tiom rezisti, tiuj damniĝu...”. Ĉi tio ne estas troigo. Oni vidas tion. Oni havas la impreson, ke multaj homoj, kiuj ĝuas junulan energion ignoras la eblecon eĉ atingi la kadukiĝon. Sed ili povos alveni tien... Ne ekzistas estonteco sen junuloj. Ankaŭ ne sen maljunuloj. Junulo estas ĉiu homo, kiu ne perdis la idealon.
El la blogo de José de Paiva Netto, verkisto, ĵurnalisto, radiokronikisto, komponisto kaj poeto.

## Pri la agado en maljunulejo

Mi salutas vin kaj mi nur sendas al vi sciigon, kiel mi vivas. Proksimume 12 klientoj venis por aŭskulti la paroladon pri Esperanto, kiu okazis en komunĉambro de la Maljunulejo en Ústí nad Orlicí. La unua parto de la projekcio temis pri angla sinjorino kun infanoj, kiuj montris, kiel ili povas kanti en Esperanto. La sekva parto de tiu ĉi diskuto daŭris per surbendigo de la kantado de la operkantisto Miroslav Smyčka el la j. 2000, kiam estis festita la 40-a datreveno de la fondiĝo de la Esperanta rondeto. Tiam la aŭskultantoj de ĉi tiu diskuto havis la okazon vidi, ke ankaŭ esperantistoj de Česká Třebová scipovas amuziĝi. La specimeno estas de la j. 2008 - ili dancis kankanon. Marie Čumová kaj Líba Dvořáková, kiuj venis el Svitavy, parolis pri Esperanto-gramatiko kaj ankaŭ pri kongresoj. Líba Dvořáková ankaŭ ripetis la deklaron de s-ano Max Kašparů, ke Esperanto estas la plej facila el ĉiuj lingvoj. Sekvis la projekcio de du partoj de filmoj el la j. 2010 por la kvindeka datreveno de la fondiĝo de la Loka Esperantista



Grupo. Kaj fine estis montrita foto el la maja renkontiĝo de esperantistoj en Šumperk.

Karel Čada

## Feliĉaj maljunuloj

Ni, kiuj aĝas bele, ni havas ĉion pri kio ni revis antaŭ 60 jaroj. Ni devas viziti nek lernejon, nek laborejon. Ni ricevas poŝmonon kaj dece ni loĝas. Iuj eĉ posedas aŭtomobilon. Ni timas nek gravedon nek morton, ni havas feliĉon esti maljunaj. Nia vivo estas brila! Ni estas nekredeble saĝaj! Nia cerbo laboras iom pli malrapide, ĉar estas plenplena de scioj. Ni vere ne estas stultaj, nur ni devas pli longe serĉi faktojn inter scioj kaj spertoj. En niaj kapoj estas amaso da aferoj, kiuj premas nian orelon, kaj tio kaŭzas malplibonan aŭdpovon. Tio estas la sama afero, kiam „hard disk“ en komputilo malrapidas, ĉar enhavas tro multe da informaĵoj. Nia cerbo ne estas malforta, sed estas plenplena. Onidire la homoj de nia aĝo ofte forgesadas, ion serĉas, ne kapablas rememori, vagadas tra sia loĝejo. Kial estas tio? Tio ne estas problemo de memoro! Tio nur naturo trudas nin, ke ni pli moviĝu.

Mi ofertas kelkajn konsilojn:
Ekzistas tri aferoj, pri kiuj malmemoru:
1. Via aĝo

2. Pasinteco
3. Plendado
Tri gravaj aferoj:
1. Amikoj
2. Pozitiva pensado
3. Silenta kaj komforta hejmo
Viaj avantaĝoj:
1. Ridetu kaj ridu konstante
2. Gimnastiku, sed nur dum propra agrabla tempo
3. Pasu tempon kun amikoj, ne nur kun parencoj kaj nepoj
Kaj plu: Trinku pli ofte, dormu pli longe, ripozu, ne atendu miraklojn, ne perdadu fidon, tenu pozitivecon kaj esperu bonon!

JoDo

Transprenita el la Legaĵoj XIII de Jindřiška Drahotová

## Ankoraŭ unu atingo de UK en Aruŝa

"Mi feliĉas, ĉar post diskuto kun la Direktoro pri la edukado en Aruŝo, mi fine ricevis permesilon por instrui Esperanton en ĉiuj ŝtataj mezlernejoj de la urbo. Mi kredas, ke ni iam ricevos ankaŭ permeson por instrui Esperanton tra la tuta nacia teritorio de Tanzanio" anoncis entuziasme John Magessa, unu el la aktivaj fortoj de la LKK de la 109-a UK kaj la ricevinto de la koncerna oficiala atestilo, la 10-an de junio 2024.
Bonvole legu plu ĉe http://surl.li/ukllh

Adje Adjévi, El la EKO 24

El la redakcio.

## El la vivo - citaĵoj

Kial Dio ne donis al hundoj la paroladon? Ĉar li volis montri al ni homoj, ke fido, lojaleco kaj amikeco eblas eĉ senvorte!

La plej belaj memoroj en la mondo estas tiuj, kiuj ridetigas vin...

**Trista anonco:**



Ni denove ricevis nur koncizan la malgajan sciigon, ke mortis nia E-amiko Inĝ. Rainer Haupt (*1951) el Hamburgo, Germanio.

Li estis multjara ano de AEH.

Honoron al lia memoro.

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.